POLONEZO

Melodio por multaj strofoj danceblaj

Teksto: balado "La trombonoj de Jeriko" de Rikardo Ŝulco

Kanto + akorda akompano

Franz-Georg Rössler



Kantisto kantas sola la multastrofan tekston.
Grupo (ankaŭ dancanta) ripetas la lasten versokvaronon (la du lastajn taktojn).

Por fini ripetu kune la unuajn du taktojn kun ties unuastrofaj tekstoj, eble per "Haleluja, haleluja."

Scienca elio

La plej grandaj haremoj

ĉe mamuloj troviĝas inter kelkaj foko-specioj. La maskloj defendas marbordajn sekciojn aŭ malgrandajn golfojn kontraŭ rivaloj. Tie ĉi ili pariĝas kun la femaloj, kiuj tie ankaŭ naskas la idojn. Rekordulo estas ursfoko-masklo, kiun oni malkovris sur la *Pribylow*-insuloj antaŭ Alasko. Ĝi estis amasiginta ĉirkaŭ si 161 femalojn. Ankaŭ la Nordaj Marelefantoj ĉirkaŭigas sin per abunda femala kompanio: dum la sezono la maskloj pariĝas kun 40 ĝis 50 femaloj, kaj tion plurfoje. La konkurenc-lukto kaj streso tamen estas senkompataj. Por fariĝi superrega masklo, marelefanto devas unue atingi aĝon de 8 aŭ 9 jaroj – tion kapablas nur unu el cent bestoj. Kaj se la vireca aĝo estas atingita, la domina masklo eltenos la daŭran interbatiĝon pri femaloj maksimume unu aŭ du jarojn. Ekzistas fakte pli malstresa formo de familia kunvivado. (2008-01-21)

Ĝisosta ostomilito

La usonanoj *Edward Drinker Cope* (1840-1897) kaj *Othniel Charles Marsh* (1831-1899) estis pioniroj pri paleontologio, la scienco pri fosiliiĝintaj besto- kaj plantorestaĵoj. Ili konatiĝis unu kun la alia dum studado en Berlino/Germanujo. Komuna al ili estis la arda kaj senbrida pasio kolekti fosiliojn, tiam tute nova hobio. Sed ĝi por ambaŭ fariĝis vera vivotasko. Ree en Usono ili efektivigis – depende kaj komence en reciproka altestimo – elstarajn trovaĵojn de fosiliaj vertebruloj en Kansaso, poste ankaŭ en Utaho, Kolorado, Norda Dakoto kaj Montano. Sed baldaŭ la komuna strebado ŝanĝiĝis en akrajn konkurencbatalojn, kiuj famiĝis sub la nomo "ostomilitoj" (angle "*Bone Wars*"). La kaŭzo de tio estis verŝajne la Elasmosaŭro, iu de *Cope* malkovrita naĝanta saŭro kun ekstreme longa kolo kaj tre malgranda kapo. Dum la kunmetado de la skeleto *Cope* eraris kaj metis la kranion sur la vostoekstremaĵon. Kiam tion vidis *Marsh*, li plengorĝe ridis ĝis larmoverŝo. Li prefere ne estu farinta tion. Ĉar la eraro de *Cope* pri la Elasmosaŭro kaj la posta reago de *Marsh* malamike disigis la du esplorantojn, ambaŭ alte estimatajn membrojn de la Nacia Akademio de Scienco. Kiam *Marsh* malkovris saŭron 30 cm longan, *Cope* mallonge poste superatutis lin per 60 m longa fosili-besto. Kiam *Cope* referencis pri trovaĵo el la *Perm*-epoko (antaŭ 260 milionoj da jaroj), tiam *Marsh* rapide traserĉis siajn ostokestojn kaj prezentis, same el la permia tempo, la plej aĝan vertebrulan fosilion de la mon-